

# FLORAJ LUDOJ

Neeble, ke, en tiu ĉi numero, ni raportu dece pri ĉiuj gravaj okazintaĵoj de la vere bela kongreso, kiun, malgraŭ ĉiuj pasintaj malfeliĉaĵoj, niaj katalunaj samideanoj sukcesis organizi.

La simpatiajn telegramojn de l' Reĝo, la imponantan prezentadon de « Mistero de Doloro », la koncertojn, la gravajn rezultatojn akiritajn laŭ proponoj de la konstanta komitato de la kongresoj, la afablajn akceptojn de l' aŭtoritatoj ni priskribos en la proksima numero de *La Revuo*, Hodiaŭ ni nur, kiel eble plej detale, raportos pri la ĉefa organizaĵo de *La Revuo* nome pri « Floraj Ludoj ».

*Lasthore*, ni kun granda ĝojo ekscias, per telegramo sendita de nia kara amiko S<sup>o</sup> Ricardo Codorniu, ke lia Majesto la Reĝo de Hispanujo nomis nian Majstron, D<sup>no</sup> Zamenhof, *Komandoro de Elizabeto la Katolika*.



## La juĝado.

Ni jam antaŭe anoncis, ke *Rektoro Boirac*, S<sup>o</sup> *Grabowski* kaj D<sup>o</sup> *Bein* bonvolis akcepti la malfacilan kaj penigan taskon esti prezidantoj de la juĝantaro. Estis juĝantoj :

- |  |   |
|--|---|
| Prof. CAMILLE AYMONIER, el Paris.                | S <sup>o</sup> JOAO KEATING, el Rio de Janeiro          |
| D <sup>o</sup> BRÉMON-MASGRAŬ, el Barcelona.     | S <sup>o</sup> GEORGE KOLOVRAT (Ruso), el Paris.        |
| S <sup>o</sup> CLARENCE BICKNELL, el Bordighera. | D <sup>o</sup> KRUKOVSKI, el Warŝava.                   |
| S <sup>o</sup> VAN DER BIEST, el Anvers.         | S <sup>o</sup> RENÉ DE LAJARTE, el Paris.               |
| S <sup>o</sup> RAOUL BRICARD, el Paris.          | S <sup>o</sup> PAUL DE LENGYEL (Hungaro), el Paris.     |
| Prof. TH. CART, el Paris.                        | D <sup>o</sup> LLAGOSTERA, el Barcelona.                |
| Prof. CHRISTALLER, el Stuttgart.                 | D <sup>o</sup> RAYMOND VAN MELKEBEKE, el Anvers.        |
| S <sup>o</sup> RICARDO CODORNIŬ, el Murcio.      | Baronino F. DE MÉNIL, el Paris.                         |
| Major GEORGE COX, el London.                     | S <sup>o</sup> SAM MEYER, el La Rochelle.               |
| Pastro DOMBROVSKI, el Kovno.                     | S <sup>o</sup> H. BOLINGBROKE MUDIE, el London.         |
| S <sup>o</sup> LEOPOLD ELB, el Dresden.          | D <sup>o</sup> NOËL, el Nancy.                          |
| S <sup>o</sup> JOHN ELLIS, el Keighley.          | S <sup>o</sup> EDMOND PRIVAT, el Genève.                |
| S <sup>ino</sup> MARIE HANKEL, el Dresden.       | S <sup>o</sup> FREDERICH PUJULÁ Y VALLÈS, el Barcelona. |
| S <sup>o</sup> H. HODLER, el Genève.             | S <sup>o</sup> PAUL RONDELEUX, el Paris.                |
| Kapitano VICENTE INGLADA ORS, el Valencia.       |   |
| S <sup>ino</sup> ROSA JUNCK, el Bordighera.      |   |

S<sup>o</sup> JOHANO ROSALS, el Barcelona.  
 S<sup>o</sup> DOMINIKO SARDA, el Sabadell.  
 S<sup>o</sup> RENÉ DE SAUSSURE, el Genève.  
 F<sup>mo</sup> SCHEFFER, el London.  
 S<sup>o</sup> JAKOBO SCHMID, el Bern.  
 S<sup>o</sup> SCHRÖDER, el Wien.  
 Prof. OTTO SIMON, el Wien.

S<sup>o</sup> FREDERIK SKEEL-GJÖRLING, el Kopenhago.  
 S<sup>o</sup> TOBELLA, el Barcelona.  
 S<sup>o</sup> ALFRED WACKRILL, el London.  
 S<sup>o</sup> ADAM ZAKRZEWSKI, el Warŝava.  
 D<sup>o</sup> LEONO ZAMENHOF, el Warŝava.

Laŭ la regularo, speciale starigita por tiu celo, ĉiu konkurso estas juĝita de *tri* juĝantoj.

Kompreneble juĝanto en unu konkurso ne havis rajton partopreni en *tiu* konkurso, sed povis partopreni en *alia* konkurso; jen kial okazas, ke en la listo de premiitoj oni trovas nomojn de juĝintoj.

La organiza komitato konsistanta el S<sup>o</sup> *Carlo Bourlet* prezidanto, D<sup>o</sup> *René Artigues* sekretario, kaj Barono de *Ménil*, asesoro, *neniel* partoprenis la juĝadon kaj nur fidele akceptis la decidojn senpartiajn de la juĝintaroj.

En ĉiu konkurso la tri juĝintoj kaj la prezidanto *tute ne* konis la nomojn de la konkursintoj. Ili do *tute* senpartie decidis, kaj nur, kiam la juĝo estis definitiva, la prezidanto sciigis ĝin al la organiza komitato, kiu *nur tiam* malfermis la kovertojn entenantajn la nomojn de la geaŭtoroj.

S<sup>o</sup> Grabowski prezidis la poezian fakon; D<sup>o</sup> K. Bein prezidis la prozan fakon; kaj R<sup>o</sup> E. Boirac bonvolis esti ĝenerala prezidanto por solvi la dubajn okazojn.

Ni do tre esperas, ke neniuj plendos pri la sincereco de l' juĝo, kaj ke eĉ la malfeliĉaj nepremiitaj konkursintoj discipline kliniĝos antaŭ la verdikto.

Cetero ni devas aldoni, ke, se kelkaj konkursoj ricevis nebonajn manuskriptojn, aliaj kontraŭe estis favoritaj per tiom da bonegaj verkoj, ke la juĝintoj bedaŭris, ke ne estis plimultaj rekompencoj.

Jen kial la organiza komitato petis la donacintojn de nealjuĝitaj premioj, ke ili bonvolu transdoni siajn premiojn, kiel *duajn* premiojn en pli sukcesplenaj konkursoj. La tuta komitato kore dankas tiujn afablajn donacintojn, kiuj tiel pligrandigis la nombron de l' laŭreatoj.



### La Festo.

En la granda belega gotika halo de l' Borso, la merkredon 8 de Septembro, la Esperantista popolo amasiĝas.

Je la kvara, la tuta urbestro, la prezidanto de l' kataluna deputitaro, D<sup>o</sup> Zamenhof, la akademio, la juĝintoj, solene eniras kaj supreniras la estradon.

Dekstre de l' publiko sidas la lokaj aŭtoritatuloj, maldekstre la Esperantistaj eminentuloj.

Funde de l' estrado troviĝas la orita trono, kie sin sidigos la Reĝino.

La Urbestro leviĝas :

« Gesinjoroj la Festo komenciĝas ! »

Tuj S<sup>o</sup> Carlo Bourlet legas sian parolon.

Poste R<sup>o</sup> Boirac anoncas, ke « oni tuj malfermos la koverton entenantan la nomon de la gajninto de la unua premio por poezio pri « Amo ».

D<sup>o</sup> Artigues malfermas la koverton, kaj legas : « S<sup>ino</sup> MARIE HANKEL ».

Kiam tondra aplaŭdado silentiĝis, R<sup>o</sup> Boirac sciigas, ke sekve S<sup>ino</sup> Marie Hankel estas « Reĝino », kaj procesie la Esperantista aŭtoritatularo iras serĉi la Reĝinon, kiu revenas ĉe la brako de R<sup>o</sup> Boirac.

Emociiga momento, neesprimebla entuziasmo dum nia tiel bonkora kaj ĉarma Reĝino sin sidigas en la tronon.

S<sup>o</sup> Chavet legas ŝiajn premiitajn versojn.

Poste S<sup>o</sup> Grabowski legas sian belegan paroladon, kaj D<sup>o</sup> Artigues legas la spritan saluton de D<sup>o</sup> Bein. Ambaŭ estas akompanataj de fervoraj aklamoj.

Nun regule disvolviĝas la festo.

D<sup>o</sup> Artigues, kun sia eleganta klara parolo, legas la liston de l' premiitoj, kaj ĉiu siavice venas saluti la Reĝinon kaj kun riverenco ricevi de ŝia mano la premion.

Niaj bonaj poetoj S<sup>oj</sup> *Ed. Privat* kaj *Clarence Bicknell* legas al la publiko siajn verkojn kaj ricevas merititajn ovaciojn, kaj, post la laste donita premio, S<sup>o</sup> Bourlet diras kelkajn vortojn por adiaŭi kaj danki la multnombrian ĉeestantaron.

En tiu rapida raporto ni ne devas forgesi : unue la « Societad de Atraccio de Forasters », kiu malavare donacis al ĉiuj venintaj sinjorinoj belajn bukadojn, kaj kiun korege aparte dankis S<sup>o</sup> Bourlet ; plie la municipalan muzikistaron, la gvardianojn kaj municipalajn rajdistojn, kiuj, en luksaj uniformoj, tiel efike helpis al la grandioza soleneco de tiu belega festo.

Parolo de S<sup>o</sup> Carlo Bourlet

Sinjoro Urbestro,  
 Sinjoroj Urbaj Konsilantoj de Barcelono,  
 Sinjoroj Deputitoj de Katalunujo.

En la nomo de la Komitato de la Unuaj Esperantaj Floraj Ludoj, en la nomo de la juĝintoj kaj konkursintoj, en la nomo de la ĉi-tie kunveninta Esperantistaro, mi respektplene adresas al vi tre koran saluton de la Esperanta naskiĝanta Literaturo, kiun vi honoras per via ĉesto.

Veninte ĉi-tien, same kiel vi kutimas veni, kiam solene proklamigas la Katalunaj poemoj, vi tiel montras, Sinjoroj, ke vi komprenis, ke Esperanto estas nun vere vivanta lingvo; lingvo, kiu havas siajn prozistojn kaj siajn poetojn; lingvo, kiu havas propran spiriton kaj genion; lingvo, per kiu la homa gento povos krei siajn ĝojojn, plori siajn suferojn, kanti siajn amojn.

Tion sentinte, Sinjoroj, vi donis al ni la plej multvaloran signon de via estimo al Esperanto, kaj pro tio, al vi, iras niaj plej sinceraj dankoj.

La afabla administranta komisio de l' palaco de la Borso permesis, ke nia festo okazu en tiu ĉi imponanta salono, kie kutime havas lokon viaj Katalunaj Floraj Ludoj, ornamis ĝin per la tradicia briliga dekoracio, kaj pretigis por nia Esperantista Reĝino la tronon de l' Katalunaj Reĝinoj; ni al la administranta komisio ankaŭ prezentas la koran esprimon de nia plej profunda dankemeco.

Kara Majstro,  
 Karaj Gesamideanoj,

Verŝajne, kiam la diverslandaj gazetistoj, kiuj kun granda intereso partoprenas niajn kunvenojn, raportos pri tiu ĉi Festo, pli ol unu el tiuj dandoj, kiuj nenion scias kaj ĉion juĝas, eksplodigos gajegan ridon :

« Ha! ha! kia komikaĵo! originalaj verkoj en Esperanto! literaturo en Esperanto! Poezio en Esperanto, en tiu malnatura lingvaĉo, en tiu ĵargono por komercistoj, en tiu slango por kelneroj! »

Kaj eĉ en la pli kleraj vicoj de kelkaj tiel diritaj « Amikoj de la Lingvo Internacia » troviĝos pli ol unu obstina teoriulo, kiu mokos nian poeziemecon, kaj kiu, kun la solena stulteco de l' falsaj

scienculoj, proklamos, ke artefarita lingvo neniam povos esti literatureca.

Je tiaj mokoĵ kaj insultoj ni jam de longe kutimiĝis; kaj niaj puraj konsciencoj, niaj harditaj koroj, nenion timante, ĉion esperante, kuraĝe daŭriros « la vojon celitan ».

Esperanto cetere ne estas artefarita lingvo, Esperanto estas natura lingvo.

Ĉu kiam ĝardenisto kulturis sovaĝajn florojn, ĉu kiam, per metoda elekto kaj racia flegado, li simplan beron aliformigas en ravantan rozon, ĉu tiam ni kuraĝas pretendi, ke tiu rozo ne estas natura floro?

Zamenhof estas nia ĝardenisto. Li elektis kaj flegis la sovaĝajn florojn de niaj naciaj lingvoj, li kulturis la kampojn de l' popolaj idiomoj, kaj, per genia laborado, li kreskigis la mirindan planton, kiun li nomis « Esperanto ».

Certe neniu el ni asertos, ke tiu juna ĵusnaskita floreto havas jam la brilan elegantecon de siaj malnovaj patrinoj; sed tamen neniu rajtas malpermesi, ke ĝi celu superan belecon.

Lingvo vivas, kreskas, firmiĝas nur per literatura verkado.

Popoloj, kiuj volas revivigi sian lingvon, kiam ĝi mortas, devas voki la helpon de beletristiko.

Tiel kreiĝis en ĉi-tiu pirenea regiono, en Toulouse kaj en Barcelono, la nobla kutimo de la Floraj Ludoj.

Por inspiri al la popolo amon al la malaperanta lingvo de l' prapatroj, por doni freŝan animon al la antikva parolo de la lando, oni vokis la poetojn.

Jen, karaj samideanoj, jen belega imitinda ekzemplo.

Ni ankaŭ, ni voku la helpon de l' verkistoj, ni voku la poetojn, ni voku la tutan junan entuziasman popolon Esperantistan, ni ĉiujare organizu literaturan turniron, kie la batalantoj svingos ne glavojn sed palmojn, kies celo ne estos rabado sed idealo kaj amo, kies rekompenco ne estos kaptitoj sed floroj, kaj tiel

« Paŝo post paŝo post longa laboro  
Ni fine atingos la celon en Gloro. »



**Parolado de S<sup>o</sup> A. Grabowski.**

Samideanoj!

La organiza Komitato de la V<sup>a</sup> Kongreso, imitante la « Florajn Ludojn » de la pireneaj landoj, aldonis al niaj internaciaj festoj similan ĉarman solenon. La poetoj, kiuj plej bele prikantis la Amon, Fidon, Patrujon, Homaron, k. t. p., ricevas el la manoj de la « Reĝino de la Festo » la rekompencojn.

Nia festo estas nomata modeste « Ludoj ». Ĉu tio devas ankaŭ signifi, ke ni ne estu tro postulemaj pri la fruktoj de nia poezia konkurso? Vere, poetoj ne atendas kutime la alvokon de konkursoj, sed kantas, kiam ilia brusto ŝvelas per la kolektita sento; do neniu konkurso ilin naskas. Nacioj atendas ofte jarcentojn, ĝis kiam grandaj bardoj inter ili aperas. Nia rilate, malgranda esperanta popolo estas ankoraŭ tre juna; tion ni konscias.

Sed malgraŭ tio nia poezia konkurso havas multe pli gravan signifon por nia lingvo kaj afero, ol oni povas opinii laŭ unua rigardo.

Jen al nia kongresa festo estas invitita je l' unua fojo la Esperantista Cindrulino. — Cindrulino mi nomas la esperantan poezion, ĉar vere ĝi estas de multaj malŝatata, forpuŝata, opiniata superflua, eĉ malutila.

Tute kontraŭe pensis nia Majstro, kiam li antaŭ dudek-du jaroj, en sia unua lernolibreto aldonis kelke da veraj poeziaj perletoj, kiujn scias parkere la unuaj dekoj da Esperantistoj, kaj kiuj ravas nin ankoraŭ hodiaŭ.

Eldonante antaŭ 16 jaroj la unuan printempan florbukedon de la esperanta poezio, la Liron de Esperantistoj, poste represitan en la Fundamenta Krestomatio, en la antaŭparolo, mi turnis la atenton sur la gravan influon, kiun havas la poezia formo en la disvolviĝo de lingvo. La plej grandan perfektigon de la lingvoj signalas ja ĉiam la apero de grandaj poetoj, kiuj, ĉerpante fidele el la komuna parola fonto, aldonas al la lingvo novajn, antaŭe ne konitajn ĉarmojn.

Esperanto, la estonta dua lingvo de l' homaro, devas taŭgi por ĉiuj celoj, sekve ĝi devas taŭgi ankaŭ por la poezio, ke ĝi povu transmeti ĉiujn belecojn de la naciaj poemoj en la internacian trezorejon de la nova tutmonda literaturo.

Guste tie ĉie ni renkontas grandan malfacilon : la facileco de lingvo internacia postulis regulecon de la konstruo kaj samtempe grandan ekonomion de la formoj; sed tiu ekonomio kaŭzas siaflanke preskaŭ neeviteblan unutonecon, ne tolereblan en ia belarto.

La belo, postulante diversecon de formoj, koloroj aŭ sonoj, estas malamiko de ĉia ŝablono.

En la krakovia reĝa katedralo mi admiris belegan plafonon en formo de ĉiela firmamento, sur kiu brilis centoj da oraj steloj aŭ rozetoj, artiste plektitaj. En kio konsistis la beleco de tiu stelaro? Jen ĉiu rozeto prezentis iom alian ornamenton, ĉiu estis alie plektita.

La tasko de la esperantista poeto estas doni al ni, krom altspirita enhavo, vere artoplenan formon. Li devas tiel esprimi sian penson, ke li ricevu eble plej grandan diversecon de la harmoniaj sonoj, tamen neniel rompante la fundamentajn principojn de nia lingvo, kiel, sub la kovrilo de poezia libereco, tion faras sentalentaj versofaristoj. Vere malfacila estas do la tasko de la esperanta poeto, sed ja ĉiu belarto postulas venkadon de grandaj malfaciloj, kaj majstro estas tiu, kiu venkis la plej grandajn.

Se ni konsideras ĉion supre diritan, la hodiaŭa poezia rikolto devas nin kontentigi. La premiitaj poetoj, venkinte multe da malfaciloj, donacis al ni serion da bonsonaj, belformaj kaj altspiritaj versaĵoj, kiuj certe riĉigos nian esperantistan poemaron.

Kiu ebenigas la vojon al la estontaj grandaj tutmondaj bardoj, tiu meritas la aplaŭdon de ni ĉiuj. Do vivu niaj kantistoj por la bono de Esperanto kaj ĝiaj altaj ĉiuhomaj idealoj! Vivu kaj ĉiam plibeligu nia modesta Cindrulino!



Saluto de D<sup>o</sup> K. Bein.

*Al Sia Regina Moŝto, Reĝino de la Festo.*

Via Regina Moŝto!

La malfavora sorto katenas min en Varsovio, kaj mi ne havos, ho ve, la feliĉon min klini antaŭ Via trono kaj persone prezenti al Via Majesto mian adoron kun humila raporto pri la rezultato de la prozaj konkursoj de l' Floraj Ludoj, per kiuj Via Regina Moŝto ĝojigas en la nuna jaro Vian fidelan popolon.

Jam multajn kunvenojn, multajn festenojn Via Reĝina Moŝto honoris per Via ĉeesto kaj aŭdis jam sufiĉe da paroladoj, mi do sternas nun antaŭ Viaj piedoj nur malgrandan folion kun mia ĝenerala impresoj, anstataŭ raporto.

Viaj konkursoj, ho Reĝino, sendube pliriĉigis nian literaturon per belaj verkoj : kelkaj havas veran literaturan valoron, la plimulto estas skribitaj en la plej pura esperanta lingvo simpla, internacia, vivanta, kaj nur en malmultaj konkursoj neniu el la aŭtoroj meritis premion. En la verkoj de plej diversnaciaj aŭtoroj nia esperanta stilo fariĝas pli kaj pli unuforma ; pli kaj pli ĝenerala fariĝas la principo, ke la bona stilo estas bazita ĉefe sur simpleco kaj natureco, kaj ke por tio en Esperanto la plej bona rimedo estas : *lerta evitado de nenecesaj sufiksoj, kunmetitaj vortoj kaj tempoj.*

Vivu do la simpla, natura Zamenhof'a Esperanto, kaj Via Reĝina Majesto ŝirmu ĝin ankaŭ en la estonteco per Via protekto !

Finante, mi kuraĝas sendi al Vi, ho Reĝino, humilan peton : ne rifuzu donaci Vian Reĝinan dankon al la komitato, kiu tiel perfekte organizis Viajn Ludojn, kaj al ĉiuj juĝantoj de la proza sekcio, kiuj tiel senpartie kaj zorgplene plenumis sian taskon.

Via sklavo, prezidanto de la juĝantaro de l' proza sekcio,

BEIN.



## PREMITARO

### Konkurso n° 1. — *Poezio pri Amo.*

Unua Premio de **Kongresa Komitato.**

*Devizo* : — Sub rozo.

*Laŭreatino* : — S<sup>ino</sup> **Marie Hankel**, el Dresden.

Dua Premio de **Svisa Espero.**

*Devizo* : — Sur vojo de l' vivo.

*Laŭreato* : — S<sup>o</sup> **Edmond Privat**, el Genève.

### Konkurso n° 3. — *Poezio pri Fido.*

Premio de **Kongresa Komitato.**

*Devizo* : — La nova mondo.

*Laŭreato* : — S<sup>o</sup> **Clarence Bicknell**, el Bordighera.

### Konkurso n° 4. — *Monografio pri Hispana Pentristo.*

Unua Premio de Iliaj Majestaj Moŝtoj la gereĝoj de Hispanujo, **Alfonso XIII kaj Victoria Eugenia de Battenberg.**

*Devizo* : — Humile al la pentristo de la Vero.

*Laŭreato* : — S<sup>o</sup> **Victor Dufeutrel**, el Philippeville.



**Dua Premio de La Revuo.***Devizo* : — Pasia amo al Soleco.*Laŭreato* : — S<sup>o</sup> **Gabriel Chavet**, el Paris.**Konkurso n<sup>o</sup> 5. — Raporto pri memorinda paĝo de l' historio.**Premio de **Lia Moŝto Johano de la Cierva**, Hispana Ministro de enlandaj Aferoj.*Devizo* : — Excelsior.*Laŭreato* : — S<sup>o</sup> **Josefo Mario Lanaŭ**, el Lerida.**Konkurso n<sup>o</sup> 6. — Ĉu estas necesa la lernado kaj propagando de Internacia lingvo.**Premio de **Lia Moŝto Barono de Bonet**, Rektoro de la Barcelona Universitato.*Devizo* : — Scientia lux et dux.*Laŭreato* : — S<sup>o</sup> **Oscar van Schoor**, el Antwerpen.**Konkurso n<sup>o</sup> 7. — Religia temo.**Premio de **Lia Moŝto D<sup>o</sup> Johano B. Benlloch**, Episkopo de Urgell.*Devizo* : — Esti ol ŝajni.*Laŭreato* : — S<sup>o</sup> **Clément Hill**, el St-Leonards (Anglujo).**Konkurso n<sup>o</sup> 8. — Aro da popolaj rakontoj.**Premio de **La Revuo**.*Devizo* : — Bona gloro pli valoras ol oro.*Laŭreato* : — S<sup>o</sup> **Leon Rozenstock**, el Krakov.**Konkurso n<sup>o</sup> 9. — Taŭgeco de la Esperantistaj Kongresoj por la disvastigado de la interna ideo de Esperanto.**Premio de S<sup>o</sup> **Alfonso Sabadell**, Prezidanto de la grupo Esperantista « Barcelono ».*Devizo* : — La popoloj faros en konsento.*Laŭreato* : — S<sup>o</sup> **Oscar van Schoor**, el Antwerpen.**Konkurso n<sup>o</sup> 12. — Temo lasita al elekto de la konkursanto (prozaĵo).**Unua Premio de **Esperantista Societo « Esperanto kaj Patrujo »**.*Devizo* : — Amo kaj paco.*Laŭreato* : — S<sup>o</sup> **Fernand Blangarin**, el Paris.Dua Premio de **Presa Esperantista Societo**.*Devizo* : — Per Esperanto, unuigo kaj Amo.*Laŭreato* : — S<sup>o</sup> **Louis Rigoir**, el Marseille.**Konkurso n<sup>o</sup> 13. — Temo lasita al elekto de la konkursanto.**Premio de **La Barcelona Deputitaro**.*Devizo* : — Dei donum.*Laŭreato* : — S<sup>o</sup> **Alex. Pride**, el Errol (Skotlando).**Konkurso n<sup>o</sup> 16. — Originala monologo prezentbla.**Premio de la **Hispana Societo por la propagando de Esperanto**.*Devizo* : — Tro multe malsanigas.*Laŭreato* : — S<sup>o</sup> **H. Boucon**, el Annecy.

**Konkurso n° 17. — *Al la plej bona verkita aro de dek-du rakontoj.***Unua Premio de **Espero Kataluna.**Devizo : — *Currente Calamo.*Laŭreatino : — F<sup>ino</sup> **L. Boistel**, el Levallois-Perret (Francujo).Dua Premio de **Societo Esperantista de Igualada.**Devizo : — *Ne hontu.*Laŭreato : — S<sup>o</sup> **Jakobo Schmid**, ĉel Bern.**Konkurso n° 20. — *Noveleto pri naciaj kutimoj.***Unua Premio de la **Biblioteko « Joventut ».**Devizo : — *Kiel belaj la antikvaj naivaj amkutimoj.*Laŭreatino : — S<sup>ino</sup> **Ella Janoušková** (Bohemino), el Philippeville.Dua Premio de **Germana Esperantisto**Devizo : — *O tempora, o mores!*Laŭreato : — S<sup>o</sup> **Oscar van Schoor**, el Antwerpen.**Konkurso n° 21. — *La Maro.***Unua Premio de **Societad de Atracción de Forasters.**Devizo : — *Laŭdu la maron, sed restu sur la lando.*Laŭreato : — S<sup>o</sup> **Clarence Bicknell**, el Bordighera.Dua Premio de **Paris-Esperanto.**Devizo : — *Bravaj kunuloj, fortege sur ondon apogu remilojn.*Laŭreato : — S<sup>o</sup> **Samuel Meyer**, el La Rochelle.**Konkurso n° 22. — *Esperanto, kiel Simbolo de Paco kaj Amo.***Premio de **Paco kaj Amo**, esperantista grupo de Gracia.Devizo : — *Vade Mecum.*Laŭreatino : — F<sup>ino</sup> **L. Boistel**, el Levallois-Perret (Francujo).**Konkurso n° 25 : — *Originala fablo.***Premio de **Vika Esperantistaro**, esperantista grupo de Vich.Devizo : — *La du ŝipoj.*Laŭreato : — S<sup>o</sup> **J. Bulthuis**, el s'Gravenhage.**Konkurso n° 27 : — *Bonhumora poezio pri la pliboneco de Esperanto rilate ĝiaj malamikaj lingvoj.***Premio de **Esperanta Fortuno**, grupo esperantista.Devizo : — *Kiel sen roso velkas la floro.*Laŭreato : — S<sup>o</sup> **H. Boucon**, el Annecy.**Konkurso n° 28. — *Versaro pri la patrina amo.***Premio de la **Suno Hispana.**Devizo : — *Patrinan amon eĉ la morto ne mortigās.*Laŭreato : — S<sup>o</sup> **Rudolf Sprotte**, el Charlottenburg.**Konkurso n° 29 : — *Rakonto por la infanoj.***Unua Premio de **Tutmonda Espero.**Devizo : — *Nenio perdiĝas.*Laŭreatino : — F<sup>ino</sup> **L. Briggs**, el Armley (Anglujo).Dua Premio de **Juna Esperantisto.**Devizo : — *Ĉokolado.*Laŭreato : — S<sup>o</sup> **Clarence Bicknell**, el Bordighera.

**Konkurso n° 30** : — *Regno de Homoj.*

Unua Premio de **D° L. L. Zamenhof.**

*Devizo* : — Tempora mutantur.

*Laŭreato* : — S° **Paul de Lengyel** (Hungaro), el Paris.

Dua Premio de S° **Ramon Tobella**, el la presejo « Tobella y Costa ».

*Devizo* : — Por la Majstro.

*Laŭreato* : — S° **P. Christaller**, el Sttutgart.

**Konkurso n° 32.** — *Loka regiona legendo.*

Premio de « **Belga Esperantisto** ».

*Devizo* : — Koran saluton al Hispanaj Samideanoj.

*Laŭreatino* : — S<sup>ino</sup> **Louis Rigoir**, el Marseille.

**Konkurso n° 33.** — *La plej bona originala rakonto.*

Premio de **Franca Esperantisto.**

*Devizo* : — Ankoraŭ unu fojon ni revenos.

*Laŭreato* : — S° **Fr. Vejmelka**, el Benešov (Bohemujo).

**Konkurso n° 36.** — *Respondo al la Malhelpisto de l' Hezito.*

Unua Premio de **La Revuo.**

*Devizo* : — Ne estas amo sen jaluzo.

*Laŭreato* : — S° **Vicente Inglada**, el Valencia.

Dua Premio de **Verda Stelo** (Meksikujo).

*Devizo* : — Kiu konas la koron de l' junulinoj?

*Laŭreato* : — S° **Beau**, el Roanne.

**Konkurso n° 37.** — *Ni fosu nian sulkon!*

Premio de **Lingvo Internacia.**

*Devizo* : — Nu.

*Laŭreato* : — S° **Carlos Riba Bracóns**, el Barcelona.

**Konkurso n° 39.** — *La plej bona monologo, preferinde el la vivo esperantista.*

Premioj de **Pola Esperantisto.**

*Devizo* (Dua Premio) : — Plej forta baro.

*Laŭreato* : — S° **Julio Morató**, el Mahon.

*Devizo* (Tria Premio) : — Almozisto.

*Laŭreato* : — S° **José Santamaria**, el Bilbao.

**Konkurso n° 41.** — *Poezio pri filatelio.*

Premio de **Tra la Filatelio.**

*Devizo* : — Kia ago, tia pago.

*Laŭreato* : — S° **H. Boucœn**, el Annecy.

**Konkurso n° 42.** — *Leviĝanta suno kaj Verda Stelo.*

Premio de **Japana Esperantisto.**

*Devizo* : — Mikado.

*Laŭreato* : — S° **Clarence Bicknell**, el Bordighera.

# LA SIMBOLO DE L' AMO

*Unua premio pri Amo.*

Rozujo sovaĝa, simbolo de l' amo,  
En vintro vi staras sen ia ornamo !  
En kampo vi nuda ĉagrenas dezerte,  
Rozujo, malvarmo mortigos vin certe.

Mallaŭte tre dolĉa voĉeto elsonas :  
« Silentu, silentu, mi dormon bezonas,  
« Min nutras denove patrino la tero,  
« Trankvile atendas mi ĝis la somero. »

Dormantan rozujon printempo vekigis,  
Somero ĝin riĉe kaj bele florigis.  
Ho, donu al mi nun kroneton belloran,  
Girlandan, balancan kaj brilekoloran !

« Ne tuŝu, ne ŝiru floraron, la mian,  
« Mi pikos, mi vundos la manon, la vian,  
« Pro amo mi miajn floretojn defendos,  
« Pro amo mi miajn pikilojn forsendos. »

Al vento ĝi florfoliojn oferis,  
Aŭtune la fruktoj fiere aperis :  
Rozujo, simbolo de l' amo vi restas,  
Trankvila, alloga, kuraĝa vi estas.

S<sup>no</sup> MARIE HANKEL.

# SUR VOJO DE L' VIVO

*Dua premio pri Amo.*

## I

Sur vojo de l' vivo vaginte tre sola,  
Dum jaroj bruemaj de l' knaba juneco,  
Kaj multe plorinte sen vorto konsola,  
Dum sonis ridad' el apuda gajeco,  
    Tagon mi renkontis voje  
    La rigardon de princino.  
    Tuŝis mian manon foje  
    Dolĉa mano de fratino.

La manon mi kaptis kaj premis tremante.  
El miaj okuloj Ŝi plorojn ĉesigis,  
Kaj sulkojn de l' frunto forigis kisante.  
Ni manon en mano la vojon daŭrigis.  
    Blue brilis la ĉielo;  
    Ĉie floris la ĝardenoj.  
    Por la haroj de l' angelo  
    Kreskis rozoj kaj jasmenoj.

Sur vojo de l' vivo nun dolĉa kaj bela  
Ni, kvazaŭ du cignoj sur blua rivero,  
Malpeze glitadis al revo ĉiela,  
Dum harpoj kantadis pri l' ama mistero.  
    Pura ŝajnis tuta mondo,  
    Bona ĉiu, bela ĉio.  
    Ĉirkaŭ ni dancadis rondo  
    De petaloj el lilio.

Ni revon mirindan komencis sen limo  
Pri lando eterna de paco kaj ĝojo;  
Kaj kanton de nia komuna animo  
Plej pure Ŝi ritmis laŭlonge de l' vojo.  
    Niajn rozojn Ŝi disdonis  
    Al malgajaj vojirantoj,  
    Kaj infanojn ofte kronis  
    Per kronetoj el diantoj.

## II

Sur vojo de l' vivo nun vagas mi sola,  
 Nezorge al kie la tempo min blovas;  
 Ĉar, kvankam min celus eĉ vorto konsola,  
 En aĝo la nuna mi vivi ne povas :

Haltis mia koro voje  
 Ĉe la tombo de l' princino,  
 Kiu donis al mi foje  
 Dolĉan manon de fratino.

La tagon, en kiu Ŝi haltis kun larmo  
 Kaj blankan la manon forŝiris el mia,  
 Mi kial ne povis en morta malvarmo  
 Ŝin sekvi sub teron al tombo glacia?

For de l' tomb' en nuna horo,  
 Min disrompas per tirado  
 Malantaŭen rememoro  
 Kaj antaŭen plu-vivado.

Sur vojo de l' vivo, pro kia mistero  
 Eĉ amo nur estas pruntaĵo momenta?  
 Ĉielon ni trovas kaj perdas sur tero;  
 Kaj blovas ankoraŭ la tempo turmenta.

Tamen ĉesu plendo mia,  
 Se antaŭen vokas devo.  
 Kantu harpo melodia  
 Pri la land' de nia revo.

Ĉar iam ni revon komencis sen limo  
 Pri lando eterna de paco kaj ĝojo;  
 Sed kanto de nia komuna animo  
 Kun voĉo karega perdiĝis sur vojo.

Kaj vagadas nun fantome  
 Mi, kun floroj en la manoj,  
 Por disporti Ŝianome  
 Al laculoj kaj infanoj.

EDMOND PRIVAT.